# Ni serĉas laboron – rolludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Praktikado de parolado pri elektita temo, ekzerci esprimojn, demandojn kun „***scias, povas, scipovas***" kaj vortojn, diversajn esprimojn rilate laboron (*dungi, salajro*, ktp).<br>Alkutimiĝi al senĝena, ne antaŭpreparita babilado. |
| **Celgrupo:** | mezniveluloj, progresantoj |
| **Antaŭpreparo:** | kartoj laŭ la aldonita skizo (vidu la duan paĝon) |
| **Tempo:** | 10 – 15 min. |
| **Ludantoj:** | minimume 4 personoj, se estas pli ol 20, necesas du grupoj, unu post la alia |

Antaŭkondiĉo: kono de leksiko pri kapabloj, nomoj de profesioj, lingvonomoj, esprimoj: *„Ĉu vi scipovas..-i?", „Ĉu vi havas...?„, „Ĉu vi parolas..?"*

Ludo:
Post kiam la gvidanto disdonas la kartojn (la ludantoj mem elektas po unu), venas la klarigoj de la ludreguloj. La ludantoj devas rememori siajn rolojn: kiujn ili volas „dungi", kiujn kapablojn ili bezonas, kaj la laborserĉantoj rememoru pri kio ili kompetentas. Poste la gvidanto kolektas la kartojn (prefere, ĉar povas okazi, ke la ludantoj mute nur montras ilin al la aliaj.)
La dungantoj restas sidantaj, dum la laborserĉantoj ĉirkaŭiras, alparolas la sidantojn, rakontas pri siaj kapabloj. Ankaŭ la dungantoj demandadas ilin klopodante scii, ĉu tiu aŭ alia estos la „taŭga" por ili.
La unua(j)n paro(j)n - kiuj trovas unu la alian - eblas premii.

Pliaj ebloj:

a) Poste ili povas pridiskuti ankaŭ pri la salajro, cirkonstancoj, libertempo, ktp.
b) Laŭ la rolo, ili povas prepari anoncojn: la dungintoj serĉantajn laborforton, la laborserĉantoj sinproponon.

| | | | |
|---|---|---|---|
| **VI SCIPOVAS:**<br><br>Naĝi, desegni kaj pentri, uzi komputilon, ludi fortepianon, kanti kaj paroli krom esperanto la francan lingvon. | **NI SERĈAS INFANVARTISTINON**<br>POSTULOJ:<br>Ŝi scipovu naĝi, kanti kaj ludi fortepianon kaj ŝalm-ludi, paroli la francan lingvon. | **VI SCIPOVAS:**<br><br>Uzi komputilon, naĝi, skii kaj rajdi, kudri kaj kuiri, vi havas stirlegiti-milon kaj aŭtomobilon. Vi parolas esperanton kaj iomete la germanan. | **NI SERĈAS DOMMASTRINON.**<br>POSTULOJ:<br>Ŝi scipovu paroli esperanton kaj la germanan aŭ la anglan, stiri aŭtomobilon, rajdi, kuiri kaj kudri. |
| **VI SCIPOVAS:**<br><br>Paroli la anglan kaj la germanan, uzi komputilon, stenografi, ludi gitaron, stiri, naĝi. | **NI SERĈAS SEKRETARIINON.**<br><br>POSTULOJ:<br>Ŝi scipovu stenografi, uzi komputilon, paroli la anglan kaj germanan. | **VI SCIPOVAS:**<br><br>Uzi komputilan programon „Word” kaj interreton. Paroli esperanton, anglan kaj germanan, naĝi, tenisi, stiri aŭtomobilon, kuiri. | **NI SERĈAS ĴURNALISTON.**<br><br>POSTULOJ:<br>Uzi komputilon, paroli esperanton, anglan kaj germanan, stiri aŭtomobilon. |
| **VI SCIPOVAS:**<br><br>Naĝi, rajdi, tenisi, skii, paroli esperanton kaj germanan, kuiri. | **NI SERĈAS TREJNISTON.**<br><br>POSTULOJ:<br><br>Li (ŝi) scipovu naĝi, rajdi, skii, tenisi. | **VI SCIPOVAS:**<br><br>Ludi fortepianon kaj violonon, kanti kaj legi muziknotojn, desegni kaj pentri. | **NI SERĈAS INSTRUIST(IN)ON** PRI DESEGNADO KAJ MUZIKO KAJ KANTO<br>POSTULOJ:<br>Li (ŝi) scipvu kanti, legi muziknotojn, ludi fortepianon kaj violonon, desegni kaj pentri. |
| **VI SCIPOVAS:**<br><br>Paroli esperanton, konas italan kaj anglan. Uzi komputilon por korespondado kaj redaktado, librotenadi, naĝi kaj rajdi, kuiri. | **NI SERĈAS GVIDANTON** POR ESPERANTA KULTURCENTRO.<br>POSTULOJ:<br>Perfekte scii esperanton, koni aliajn okcidentajn lingvojn (germanan, italan aŭ francan). Uzi komputilon por korespondado kaj redaktado, librotenadi. | **VI SCIPOVAS:**<br><br>Paroli bone esperanton, ludi gitaron kaj kanti, naĝi, glitumi kaj kuiri. | **NI SERĈAS HELPANTON** POR ESPERANTO-CENTRO<br><br>POSTULOJ:<br><br>Li (ŝi) parolu bone esperanton, scipovu kanti kaj kuiri. |
| **VI SCIPOVAS:**<br><br>Kalkuli kaj librotenadi, naĝi kaj skii, uzi komputilon, kanti. | **NI SERĈAS LIBROTENISTON.**<br><br>POSTULOJ:<br>Ŝi/li povu bone kalkuli, librotenadi, tajpi. | **VI SCIPOVAS:**<br><br>Rajdi, glitumi, uzi komputilon, stiri aŭtomobilon, paroli esperanton. | **NI SERĈAS ŜOFORON.**<br><br>POSTULOJ:<br>Li/ŝi povu stiri aŭtomobilon, paroli esperanton. |